

Heinrich Heine,  
Milde fluas tra la kor'

*tradukita de Valentin Melnikov*

Milde fluas tra la kor'  
kanto primavera.  
Flugu, melodi-sonor',  
en la vast' aera.

Flugu longe, sen ripoz',  
super domoj flutu.  
Se troviĝos tie roz' –  
ĝin de mi salutu.

*Traduko de la Germana poemo  
"Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE  
(\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de  
Valentin Melnikov.*

*Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de s-ro  
Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto  
<http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov>  
. Vidu: <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html>.  
Vidu ankaŭ: <http://www.esperanto.mv.ru/Melnikov/index.html>.*

Heinrich Heine,  
Printempa saluto

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

Iras ĉarma sonoret'  
Tra de mi animon.  
Sonu printemo kantet'  
En la malproksimon!

Ĝis la dom' forsonu vi,  
Kie floroj pendas!  
Diru al la roz', ke mi  
Saluteton sendas.

*Traduko de la Germana poemo  
"Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE  
(\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de  
LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919)  
en 1908.*

*Arg-527-1045 (2010-03-14 15:53:26)*

*Tiu ĉi esperantigo de la poemo estas vere iom  
fuŝe tradukita. Ĝi aperis en programo de kon-  
certo el la jaro 1908 (laŭ informo de la dana s-  
ano Lars Kromann [[lars.kromann@mail.dk](mailto:lars.kromann@mail.dk)]).  
Pri Ludwig Emil Meier rigardu ankaŭ la vi-  
kipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Emil\\_Meier](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier).  
Li verkis interalie la kant-libreton "Esperantista Kantaro", kiu ape-  
ris en 1907 ĉe la Esperanta eldonejo de Hans  
Theodor Hoffmann en Berlino.*

Heinrich Heine,  
Frühlingsbotschaft

Leise zieht durch mein Gemüt  
Liebliches Geläute  
Klinge, kleines Frühlingslied,  
Kling hinaus ins Weite.

Kling hinaus, bis an das Haus,  
Wo die Blumen sprießen,  
Wenn du eine Rose schaust,  
Sag, ich laß sie grüßen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE  
(\*1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-527-1043 (2010-03-14 15:54:47)*

*Tiu ĉi poemo troviĝas interalie ankaŭ en la reta kolekto "Gu-  
tenberg.Spiegel" sub [http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&x&d=1136&kapitel=10&cHash=3da378c6dbfruehlin#gb\\_found](http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&x&d=1136&kapitel=10&cHash=3da378c6dbfruehlin#gb_found).*